# *Havana World Music: festivalo por la kultura identeco.*




Havano, 21 mar (RHK) La urba parko de Havano, en la areo ?e la rivero Almendares, estos unu el la sidejoj de la kvara eldono de la muzikfestivalo Havana World Music okazonta de la 23-a ?is la 26-a de marto, kies ?efa bazo estas kulturo kaj efektivigos koncertojn kaj atelierojn pri muziko kaj dancoj.

La prezidantino de la organiza komitato, Eme alfonso, informis dum gazetara konferenco, ke post la ina?guro, okazonta en la sidejo de la Fabriko de Kuba Arto, la areo ?e Almendares havos du scenejojn por koncertoj kaj du tendojn, kie okazos samtempe infan-atelieroj malfermaj al ?iuj interesitoj.

Eme Alfonso aldonis ke oni pentros arta?ojn sur du muroj en la parko kaj ene de la atelieroj elstaros tiuj pri orientaj dancoj flanke de la hispana dancistino Sara Guirado, alia pri bulgara muziko flanke de Vlada Tomova, kaj aliaj pri break danco flanke de Be Boys.

Alia nova?o kiun elstarigis la organizantoj rilatas al la celebroj okaze de la Oran?a Tago en la batalo kontra? la genra perforto, la 25-an de marto, kaj la prezento de la bando ***La cruzada*** kaj la koruso ***Vocal Luna***, elektitaj dum alvoko al konkurso de juna talento ***Primera Base***.

Sub la linio fortigi la kulturan identecon internacie rilate la originajn radikojn baze de moderneco, la festivalo Havana World Music havas kiel antecedento la projekton ***Por miksi*** sponsorita de la Hispana Ambasado en Kubo kaj Unesco.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/124758-havana-world-music-festivalo-por-la-kultura-identeco

**Radio Habana Cuba**